Ĉu vi Vere Scias la Prezon de Viando?

La Covid19-a viruso estas nova infektokaŭzo, sed el socia vidpunkto ĝi estas nur alia ekzemplo de io, kion oni povas nomi Marmota Sindromo*. Dum la lastaj 25 jaroj, Britio suferis plurajn disrompajn medicinajn krizojn: "frenezbovina" malsano, la krizo de "piedo kaj buŝo", birda gripo, porka gripo, kaj nun la kronovirusa pandemio. Ni ŝajnas senproteste akcepti tiajn krizojn, kiuj kostas milionoj da pundoj kaj miloj da homaj vivoj, kiel parto de la natura ordo de aferoj. Pestoj estas konsideritaj kiel naturaj plagoj ekde pratempoj, sed ili ne estas tute naturaj fenomenoj, kiel tertremoj aŭ vulkanoj. Homaj agadoj forte influas ilin.

Radike, tiuj ĉiuj devenas el disvastiĝita praktiko, kiu fakte estas nuntempe nedeviga, nome la karnomanĝado. Niaj metodoj de bestuzado permesas, ke bakterioj kaj virusoj povas "salti inter specioj" el bestoj en la homaron. La plejparto de medicinaj fakuloj kredas, ke la Ebola kaj la Zikaviruso ankaŭ estas infektoj, kiuj saltis el bestoj al homoj fare de buĉado de sovaĝaj bestoj por nutraĵo. La problemo estas tutmonda, ne limigita al Britio aŭ al la Okcidento.

Jam delonge estas tempo por publikigi kaj publikigadi la fakton, ke inter la multaj nedezirindaj konsekvencoj de la ekspluatado de bestoj por homa konsumo -- precipe kiel praktikata de moderna, tutmonda agroindustrio -- estas oftaj, detruaj malordoj. Ĉi tiu kaŝita kosto ne plu estu kaŝata.

[* Tiu esprimo aludas al filmo de 1993, kiu nomiĝas "Groundhog Day" (Marmota Tago), en kiu la ĉefrolanto devas plurfoje sperti la saman tagon ĝis ... sia koro ŝangiĝas kaj la vera amo venkas!]

[Riksablo, March 2020.]